Universala Esperanto-Asocio

KONGRESO, AMO, ESTRARO, KONSILIO

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2015-41 sendita el Budapeŝto la 13an de septembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

# Raporto pri la Kongreso en Rumanio

### Kongreso – denove post kvarjara paŭzo


Okazis en Timişoara (la tria plej granda urbo de Rumanio) septembre 4-6 Tutlanda Kongreso; okazis simpozioj tra la lastaj tri jaroj (vidu EKO 2014-45 de sept 28) . La nuna kongreso altiris ĉ. 40 partoprenantojn, plejparte el la okcidento de la lando. Mankis el Bukuresto kaj orientaj urboj. Kongresejoj estis Liceo (kuna loĝado) kaj la Okcidenta Universitato. Ambaŭ lokoj disponigis faciligojn kaj la kostoj estis subvenciataj. Okazis Arta Vespero en apuda kulturcentro kaj simpozio dulingva en la universitato, kiu tamen ne altiris malmultajn neesperantistojn.

### Elektojaro

2015 estas elektojaro en EAR (Esperanto-Asocio de Rumanio);la elektoj okazis laŭ nova statuto, akceptita en la kongreso. Estis elektita kvinpersona estraro kun tri timiŝoaranoj. La prezidanto estas Aurora Bute, komitatano de UEA kaj aktivulo en ILEI. La nova kasisto junas kaj regas bone la lingvon, kaj financojn. Tri estraranoj havas bonajn universitatajn kontaktojn, kaj tia agado fariĝos ĉefa kampo por EAR. Laŭ la nova statuto, estas nomumita dek-persona skipo (do 15 entute) kiu formas Nacian Konsilion (la ekvivalenton de la Komitato en UEA), kun bona distribuo tra la lando.

### Nova statuto

Tio estis ellaborita kunlabore kun advokato, kaj modifas la strukturon de la Asocio (EAR). Elektoj plue okazos ĉiun trian jaron. La kunvenintoj rumanlingve akceptis la dokumenton; ĝi nun estos jure deponita. La sidejo de EAR restas en Timiŝoara.



### Rejunigo

Okazas kursoj en Timiŝoara, kaj almenaŭ du junulaj kongresanoj parolas flue kaj aktivas, pliaj ekzistas, sed devas ankoraŭ ekzerci la lingvouzon. Pli esperiga situacio ol trovita tra la lastaj jaroj.

### Roloj de UEA

Partoprenis la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill, kiu konsentis plenigi dufoje jare paĝon en la asocia revuo ES-TO por konigi aktualaĵojn pri UEA. Li (malsurprize) varbis pri AMO 17 jarfine en Eger, Hungario, kun temo 'Junigi la komunumon', por kiu UEA aljuĝos stipendiojn al junuloj aŭ junulgivdantoj tra la sudorienta parto de Eŭropo. En 2016 – eble septembre – EAR volas okazigi internacian aranĝon, ĝuste pri la universitata kunlaboro. UEA

promesis diskonigan helpon.  Donacitaj libroj kaj revuoj estis venditaj kaj la enspezita mono uzata por membrigoj, ekzemple al UEA kaj ILEI.

**Prijuĝo**

Pozitiva. La financa bazo stabiliĝas, eĉ se kun tre limigitaj rimedoj. La emfazo je universitata agado (ja ne nova fenomeno) ŝajnas pozitiva kaj fleginda, precipe per kontaktoj kun najbaraj kaj aliaj landoj.

**La Nacia Konsilio** Tio konsistas el 15 personoj:

*Universitatanoj:*

1. Şova Robert-Aurelian (ASE Bucureşti)
2. Konnerth Sara (Univ. Lucian Blaga, Sibiu)
3. Pitar Mariana (Univ. de Vest, Timişoara)
4. Frenţiu Luminiţa (Univ. De Vest, Timişoara)
5. Cosma Dorin (Univ. De Vest, Timişoara)

*Spertaj esperantistoj:*

6. Crăncău Emil (Baia Mare)
7. Trifoi Mihai (Bixad, Covasna)
8. Popa Florica (Timişoara)
9. Berariu Mariana (Gherla)
10. Popoviciu Ecaterina (Oradea)
11. Weisz Ioan (Baia Mare)
12. Bute Aurora (Timişoara)

*Aldoniĝas, salutinde, tri junuloj (kun celo, ke iam triono en la konsilianoj estu junaj)*

13. Birta Petronela (Timişoara)
14. Dolca Adriana (Timişoara)
15. Tiron Elena (Braşov)

*La Komitato (estraro) konsistas el  kvin personoj:*

- prezidanto: Aurora Bute
- vicprezidantoj: Şova Robert, Crâncău Emil, Pitar Mariana
- estrarano pri financoj: Birta Petronela

La sekretario (ekster la estraro) estas Popa Florica.

Pretigis: Stefan MacGill kaj Aurora Bute.

## Bitoteko kun gazetoteko

Hispana Esperanto-Federacio funkciigas interretan bibliotekon *Bitoteko* - kolektejon de elektronikaj versioj de multaj kaj interesaj Esperantaj literaturaj materialoj. La biblioteko havas subfakojn (literaturo, tradukoj, infanlibroj, ktp.), signifan ne nur en hispania, sed ankaŭ en internacia nivelo.

Subfako 'Gazetoteko' enhavas 124 legeblajn kaj elŝuteblajn Esperanto-gazetojn, inter ili interesaĵojn kiel *La Praktiko, Bulteno de ATEO (ateistoj), Esperanta Numismatiko, Familia Esperanto* kaj multaj aliaj. La plej freŝa kolekto en Bitoteko estas la **Kongresaj Kurieroj**, t.e. la ĉiutagaj informiloj, eldonitaj dum la Universalaj Kongresoj. En la kolekto troviĝas **ĉiuj kurieroj de ĉiuj UKoj** ekde 1908 ĝis 2015 –ĉiuj ili estas legeblaj kaj elŝuteblaj en formato PDF. Gratulon al Roland Rotsaert, la Fondaĵo Vanbiervliet kaj la zorgantoj de Bitoteko pro tiu sindona laboro kaj kunlaboro! Aliru la bitotekon: http://bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/

Perita de RET-Info

## AMO refoje en tri kontinentoj ene de tri monatoj

En la sekva komuniko EKO ni donos detalojn pri la sekvaj kvar AMO-seminarioj, (17 ĝis 20), kiuj portos nin tra la sekvaj monatoj. Jen la listo:



AMO 15 Greziljono, Francio, okt.
AMO 16 Havano, Kubo, nov.
AMO 17 Eger, Hungario, dec. 28-31
AMO 18 Závažná Poruba, Slovakio, jan.
AMO 19, Manaus, Brazilo, jan.
AMO 20, Katmanduo, Nepalo, feb.

## Estraro kaj konsilio kunsidis

En la 12a de septembro, la Estraro de UEA okazigis sian dusemajnan skajpan kunsidon. 90 minutoj pruviĝis malsufiĉa por la 14-punkta tagordo, el kiuj nur ok estis atingitaj, la ceteraj pluiros per korespondado.

1. **Komitata protokolo el Lillo**: bone progresas, preskaŭ preta.
2. **Unuaj testaj retvoĉdonoj** de la komitato: unu publika kaj unu sekreta voĉdono pretigataj
3. **Afrika Komisiono**: propono de la komisiono pri reviziita konsisto: Akceptita.
4. **Laborplano 2015-16:** En finpreparo.
5. **Rezulto de reteja konkurso:** Finiĝos post du tagoj, la mastruma teamo pritaksos la rezultojn.
6. **Propono pri enketo pri UK:** Reta enketo aprobita, teameto enrigardos la demandojn.
7. **UK-gvidlibro:** Laborteamo estas eklaborigita pri kreo de gvidilo por organizado de UK.
8. **UK Nitra – temo:** Unua propono ankoraŭ sub diskuto, i.a. kun LKK Nitra.

   Ĉiu temo post nun ne atingita, traktendaj retpoŝte.

9. **Revuo Esperanto**, evoluoj kaj redaktora kontrakto
10. **Varbado: membroj, donacoj, anoncoj:** Temo por la Konsilio. Mastruma kunsido en sekvaj tagoj.
11. **Krynica, ekonomia forumo:** Okazis 8-10 sept; EEU aktivis, UEA-reprezentanto: estrarano Pietrzak.
12. **AMO – tri aprobotaj seminarioj por 2016:** Aldone al la ses listigitaj supre.
13. **Eŭropa Tago de Lingvoj:** UEA iel enplektiĝos.
14. **Prezenta teksto pri Laborplano 2015-2016:** verkita sed bezonas aprobon.



Post la Estrarkunsido okazis kunsido de la Konsilio, kiun la nuna verkanto bedaŭrinde ne povas resumi.

Vortoj 940.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiche 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...